
423

# LA SKOLTA MONDO

VOLUMO 4 N·RO 3.
·A JARKVARONO 196

RGANO DE LA SKOLTA ESPERANTISTA LIGO
·FONDITA EN 1918·

Taxusstraat 7
№ 394



Karaj geamikoj!

Kun granda ĝojo mi denove - iom malfrue - elsendas novan numeron de La Skolta Mondo.
Dum la jam pluraj jaroj en kiuj mi estis via redaktoro, mi povis de multaj flankoj aŭdi eĥojn de mia laboro, kaj jen - tio estas plej ĝojiga. Kaj ankaŭ nun vi povas vidi rezulton el unu tia eĥo: la nova elformo de la lasta paĝo de la kovrilo. La ideo venis el Usono, kaj mi kore dankas al CSO pro tio, kaj pro multaj aliaj sugestoj en lia letero, sugestoj, kiujn mi pripensos kaj prilaboros, al la bono de nia gazeto kaj per ĝi de nia Ligo.
Samtempe mi rektas al ĉiuj aliaj leterskribintoj varman dankon pro laŭdo kaj kritiko, pro materialo kaj pro sugestoj. Kune ni povos krei valoran, belan kaj legindan revuon!

Via

Hans Amund.

# FINNLANDO

estis la centro de granda aktiveco dum tiu ĉi somero. Tie la Universala Kongreso okazis, kaj dum ĝi skolta kunveno. Antaŭ la kongreso, la KELI-anoj trapasis kuneston en Finnlando, kaj oni raportas el ĝi, ke ĝi estis tre sukcesa.
En Finnlando la skoltinoj de la tuta mondo aranĝis kunvenon de plej altrangaj estroj, poste la skoltoj havis saman aranĝon. Kaj, kiel vi scias, dum tiu aranĝo komencis la tutmonda agado de nia SEL, konata sub la nomo "Adopta Plano".
En Finnlando do la komenco okazis, la solena transdono de la nova lernolibro , la "Jamborea Lingvo" de J K Hammer, nia tre aktiva kaj sperta ĝenerala sekretario.
La plua evoluo de la plano dependes de ni - la unuopaj membroj de SEL.
Ni donos en tiu ĉi numero vastan lokon al Finnlando, kaj nur bedaŭras, ke ni ne povis eĉ pli raporti el nia tre bela norda lando, fratina lando.
Ni ricevis bildojn de nia N.R., Seppo Tella, sed ĉar ili estas kolorbildoj, ni ankoraŭ ne scias, ĉu estas eble redoni ilin. Pro tio ni kolektis tiujn bildojn sur unu paĝo, al kiu paĝo ni faris alternativon, ke la presejo povu decidi, ĉu la bildoj estas preseblaj aŭ ne. Se mankas la bildoj, vi scias la kaŭzon, kaj ne kulpigu Seppon Tellan.

## S ☆ E ☆ L

Fondinto: "Avoto"
Kunfondinto: J.W. Leslie

Honoraj Prezidantoj:
"Avoto". Norman Booth.
Kolonelo D. H. Davis.
L. J. VanGulck.

Prezidanto: Douglas Murphy,
39 St. George's Road,
Felixstowe, Suffolk, Britujo.

Sekretario: J. K. Hammer,
Taxusstraat 7, Zaandam,
Nederlando.

Kasisto: David H. Withey,
21 Brookfield Avenue,
Waterloo, Liverpool 22,
Britujo.

Redaktoro: Hans Amund Rosbach
Nergt 37 c, N-6500 Kristiansund N, Norvegujo.




# RAPORTO

pri la kunveno de S.E.L.
en salono Canuto, Dipoli
Otaniemi, Finnlando.




Prezidis SEPPO TELLA el Finnlando, kiu ankaŭ raportas al LSM laŭ la protokolo fare de W.G DU TEMPLE el Kanado. Ĉeestis 34 geskoltoj kaj interesiĝintoj el 15 diversaj landoj.

La prezidanto bonvenigis la ĉeestantojn, kaj memorigante al la kunvenanoj la ĉijaran agadmoton de Finna Knabskolta Asocio "Internacia Skoltismo", konstatis, ke dum tiu ĉi somero okazas en Dipoli 3 tre gravaj, anticipe iom diferencaj, skoltkunvenoj. Junie konferencis jam la skoltestrinoj de la mondo, aŭguste tutmondaj altrangaj skoltestroj. Sed la kunveno de S.E.L. ne estas malpli grava kaj interesa. Li daŭre memorigis al la kunveno la kvaran skoltan leĝon, kiel fundon de la kunveno.
Sekvis sinprezentato, dum kiu oni ankaŭ aŭdis pri la situacio de la skoltismo en diversaj landoj. Precipe bonvenigitaj estis eminenta rusa profesoro David Armand, iama skoltestro antaŭ 50 jaroj, kiam skoltismo ne estis malpermesata, kaj skoltineto kun sia patrino el Ĉeĥoslovakio, kie, laŭ ŝia paroleto, oni aktuale tre pozitive sintenas al skolta agado tute ne politika. Cetere oni rimarkis, ke estas partoprenantoj el ĉiuj skandinaviaj landoj.
La prezidanto superrigardis la agadon de S.E.L., kaj prezentis kelkajn problemojn al libera diskutado. La plej esenca temo estis la ebleco esperantigi skoltojn. La tutenova lernolibro "Ĵamborea Lingvo" vekis multe da intereso, kaj 12 personoj libervole anoncis sin por esti pli detale informita pri la Esperantoinstruado ekz. per tiu libro.
La kunveno substrekis la gravecon de la 6-a Internacia Ĵamboreo en Essex la ĝia sciiga aspekto: multaj aŭdis pri Esperanto, pli multaj devus aŭdi.
Oni ne ignoris, ke monproblemo estas malfacile suprenirebla. S-ino Schulze el Usono proponis skoltan fonduson por ĵamboreaj motivoj. Oni eble povus aranĝi iometan stipendion al tre aktivaj kursanoj.
Temis ankaŭ pri la transdono de lernolibroj dum la aŭgusta Monda Konferenco. Sekve de la problemo en Japanujo post 2 jaroj, kreskis vigla diskuto pri metodoj. Israela elektroinĝeniero Savir, kiu antaŭnelonge bonege gvidis Esperantokurson en Turkua someruniversitato (Finnlando) diris, ke liaj unuaj kursoj estis ĝuste por skoltoj, kaj pro tio li opiniis, ke la ĴL estu unuavice instruata por ĵamboreaj skoltoj. S-ro Salzmann el Germanujo siaflanke - kiel sperta Esperantoinstruisto - celkonscie opiniis, ke Esperanto estu instruata al ĉiuj - al plejeble multaj. Oni plue povus organizi semajnfinan tendareton, kie kunvenos skoltoj el diversaj landoj. Gravegas, ke ĉiuj Esperantoinstruistoj havu la adresojn de ĉiu alia, por ke spertoj estu ŝanĝataj.

Du tagojn poste naŭ skoltoj - el Danlando, Aŭstralio, Ĉeĥoslovakujo, Nederlando, Svedujo kaj Finnlando - vizitis la Centroficejon de Finna Knabskolta Asocio, kie oni kontaktis kaj parolis kun la Ĉefsekretario kaj Informsekretario de FKA (SPJ) kaj subskribis la vizitlibron.

# LA 22·A MONDA SKOLTE KONFERENCO EN DIPOLI 21-27 V



Jen kio okazis:
Jam vintre-printempe mi interkonsultis kun kolonelo B.W. Kontiopää, la prezidanto en la komitato finna, kiu prizorgis la organizadon de la konferenco, alivorte Konferenca Koordinatoro, pri la eblecoj disdoni la "Ĵamborean Lingvon" kaj prezenti ĝin per parolo (angle aŭ france) antaŭ la Skolta Konferenco en Dipoli. Nu, ĉio progresis laŭplane, kiel mi diris en la kunveno julia de SEL. Ĉiam kol. BWK tre pozitive opiniis pri la skoltesperantistoj.
La definitivan tempon por disdoni la librojn decidis la kunveno de la Monda Komitato (la 19-an de aŭgusto) laŭ la propono de BWK al la 22-a de aŭgusto, kiel konsentite kun mi. Por certigi pri la dato mi de marde vespere (la 19-an) telefonis al BWK el Imatra, kaj li kun vera malgajo devis respondi, ke la Monda Komitato malpermesis al mi paroli antaŭ la Skolta Konferenco kaj tiel parole prezenti la libron. BWK tute ne komprenis la decidon, sed tio ja ne estis en lia povo; la internajn metodojn kaj demandojn de la kunveno entute fiksas la Monda Komitato. Ilia motivado: ne temis pri S.E.L., sed tio estas ĝenerala, antaŭe decidita maniero.
Do mi havis unu tagon por prepari la multobligaĵojn, ĉar nature parolon oni ne povas direkte multobligi por esti legata. La 21-an de aŭgusto mi vojaĝis al Helsinki, kaj la 22-an, antaŭ la unua oficiala kunveno, la 150 ekz. de la lernolibro, pri kiuj mi disponis, estis surtabligitaj laŭkvarte al la nombro de ĉiu delegitaro. Multobligitaj estis ankaŭ du tekstoj en po 200 ekz. en la angla: la unua - instiga kaj informa parolеto al estroj, la dua - sciigoj pri SEL. Krome kun la libroj estis la adreslistoj de niaj reprezentantoj en ĉiuj landoj.
Laŭ mia sperto la plej fatala eraro de SEL (aŭ eble tio estis tute mia eraro) estis tiu, ke la Centra Komitato de SEL estu klopodinta konduki la disdonon de libroj en la internan programon de la Konferenco, kiun pretigas (nun mi tion scias) la Monda Oficejo en Svisujo, ne la finna komitato, kiun mi insiste "trudepetis".
Konkreta rezulto al malpermeso de parolo estas, ke mi ne povis streĉe aŭskulti, kiel "la arbaro eĥigis" nian vokon. Sed, almenaŭ la sciiga valoro, laŭ mia kompreno, de la disdonado de lernolibroj al tutmondaj skoltestroj, estis treege bona.

Seppo Tella.

# SEPPO 'PAROLAS':

Dear Brother Scouts.

"For Understanding" - this is the theme chosen for the next World Jamboree in Tokyo in 1971. Undoubtedly, it is one of the best themes ever chosen. Scouting expressly aims at international, even supernational idea of brotherhood.

However, there is a but - in order to understand one another - we must be able to speak to each other. We come to the highest wall that inconveniences international mutual understanding: i.e. language.

It is currently acknowledged that a man is able to master only one foreign language, besides his own mother tongue, but even that foreign language somewhat imperfectly. And yet there are scouts in numerous countries. How to communicate with scouts all over the world? It is not enough, in my opinion, to be able to listen to English fluently, or smile wonderfully in French.

Let us point out what Baden-Powell himself said about the language problem. Let us cite the article for "World Scouting", prepared by Mr. J.Van Gulck, Hon.President of Scout Esperantist League and Hon.County Commissioner in Belgium: "..Baden-Powll gave a hint himself in his Book SCOUTING FOR BOYS: If you want to use a secret languade in your patrol, you should all set to work to learn Esperanto. It is not difficult and is taught in a little book costing one penny (of course it is now a bit more expensive). This language is beeing used in all countries so that you would be able to get on with it abroad now." However, Esperanto is NOT a secret language but a living language of a living people, all over the world Esperanto belongs to nobody, and therefore belongs to everybody. It is comparatively simple to learn, even for those who have no "bump for languages". Esperanto is not just a "jolly good idea", it has reached maturity as a language, and is ideally suited to serve as a Jamboree language, and at all kinds of Scout and Guide international events."

Scout Esperantist League has published a new direct-method illustrated textbook of Esperanto, especially for Scouts and Guides. Perhaps some of you has not heard

Karaj Skoltfratoj.

"Por komprenado" - tio estas la temo elektita por venonta Monda Ĵamboreo en Tokio en 1971. Sendube tio estas unu el la plej bonaj temoj iam elektitaj. Skoltismo speciale celas al internacia, eĉ supernacia ideo de frateco.

Tamen, estas iu "sed" - por povi kompreni unu la alian, ni devas kapabli paroli unu al la alia. Ni atingas al la plej alta baro, kiu malhelpas la internacian buŝan komprenigon: t.e. la lingvo.

Oni nun ĝenerale agnoskas, ke homo kapablas majstri nur unu fremdan lingvon apud sia propra patrina lingvo, sed eĉ tiun fremdan lingvon nur iom malperfekte. Kaj ja estas skoltoj en multnombraj landoj. Kiel interkontakti kun la skoltoj en la tuta mondo? Ne estas sufiĉe, laŭ mia opinio, ke oni povas flue aŭskulti en la angla lingvo, aŭ bele rideti franclingve.

Ni rigardu kion Baden-Powell mem diris pri la lingva problemo. Ni citu el la artikolo por "World Scouting", verkitan de s-ro J.Van Gulck, honora prezidanto de S.E.L. kaj honora distrikta komisario en Belgujo: "..Baden-Powell mem donis sugeston en sia libro SKOLTADO POR KNABOJ: Se vi deziras uzi sekretan lingvon en via patrolo, vi devus ĉiuj komenci lernadon de Esperanto. Ĝi ne estas malfacila, kaj vi povas lerni ĝin el libreto, kiu kostas unu penny'on (kompreneble ĝi estas iom pli multekosta nun). Tiu lingvo estas uzata en ĉiuj landoj, tiel ke ĝi povas helpi vin eksterlande nun. "Tamen, Esperanto NE estas iu sekreta lingvo, sed vivanta lingvo de vivanta popolo, ĉie super la mondo Esperanto apartenas al neniu kaj tial apartenas al ĉiu. Ĝi estas relative facila lerni, eĉ al tiuj kiuj ne havas specialajn lingvajn lernokapablojn. Esperanto ne estas nur "treege bona ideo", ĝi atingis al matureco kiel lingvo, kaj estas ideala por servi kiel ĵamborea lingvo, kaj por ĉiaj internaciaj geskoltaj okazaĵoj."

Skolta Esperantista Ligo publikigis novan rektmetodan ilustritan lernolibron pri Esperanto, speciale verkitan por geskoltoj. Eble iuj el vi neniam aŭdis pri Esperanto

# SEPPO 'PAROLAS':

Dear Brother Scouts.

"For Understanding" - this is the theme chosen for the next World Jamboree in Tokyo in 1971. Undoubtedly, it is one of the best themes ever chosen. Scouting expressly aims at international, even supernational idea of brotherhood.

However, there is a but - in order to understand one another - we must be able to speak to each other. We come to the highest wall that inconveniences international mutual understanding: i.e. language.

It is currently acknowledged that a man is able to master only one foreign language, besides his own mother tongue, but even that foreign language somewhat imperfectly. And yet there are scouts in numerous countries. How to communicate with scouts all over the world? It is not enough, in my opinion, to be able to listen to English fluently, or smile wonderfully in French.

Let us point out what Baden-Powell himself said about the language problem. Let us cite the article for "World Scouting", prepared by Mr. J.Van Gulck, Hon.President of Scout Esperantist League and Hon.County Commissioner in Belgium: "..Baden-Powll gave a hint himself in his Book SCOUTING FOR BOYS: If you want to use a secret languade in your patrol, you should all set to work to learn Esperanto. It is not difficult and is taught in a little book costing one penny (of course it is now a bit more expensive). This language is beeing used in all countries so that you would be able to get on with it abroad now." However, Esperanto is NOT a secret language but a living language of a living people, all over the world Esperanto belongs to nobody, and therefore belongs to everybody. It is comparatively simple to learn, even for those who have no "bump for languages". Esperanto is not just a "jolly good idea", it has reached maturity as a language, and is ideally suited to serve as a Jamboree language, and at all kinds of Scout and Guide international events."

Scout Esperantist League has published a new direct-method illustrated textbook of Esperanto, especially for Scouts and Guides. Perhaps some of you has not heard

Karaj Skoltfratoj.

"Por komprenado" - tio estas la temo elektita por venonta Monda Ĵamboreo en Tokio en 1971. Sendube tio estas unu el la plej bonaj temoj iam elektitaj. Skoltismo speciale celas al internacia, eĉ supernacia ideo de frateco.

Tamen, estas iu "sed" - por povi kompreni unu la alian, ni devas kapabli paroli unu al la alia. Ni atingas al la plej alta baro, kiu malhelpas la internacian buŝan komprenigon: t.e. la lingvo.

Oni nun ĝenerale agnoskas, ke homo kapablas majstri nur unu fremdan lingvon apud sia propra patrina lingvo, sed eĉ tiun fremdan lingvon nur iom malperfekte. Kaj ja estas skoltoj en multnombraj landoj. Kiel interkontakti kun la skoltoj en la tuta mondo? Ne estas sufiĉe, laŭ mia opinio, ke oni povas flue aŭskulti en la angla lingvo, aŭ bele rideti franclingve.

Ni rigardu kion Baden-Powell mem diris pri la lingva problemo. Ni citu el la artikolo por "World Scouting", verkitan de s-ro J.Van Gulck, honora prezidanto de S.E.L. kaj honora distrikta komisario en Belgujo: "..Baden-Powell mem donis sugeston en sia libro SKOLTADO POR KNABOJ: Se vi deziras uzi sekretan lingvon en via patrolo, vi devus ĉiuj komenci lernadon de Esperanto. Ĝi ne estas malfacila, kaj vi povas lerni ĝin el libreto, kiu kostas unu penny'on (kompreneble ĝi estas iom pli multekosta nun). Tiu lingvo estas uzata en ĉiuj landoj, tiel ke ĝi povas helpi vin eksterlande nun. "Tamen, Esperanto NE estas iu sekreta lingvo, sed vivanta lingvo de vivanta popolo, ĉie super la mondo Esperanto apartenas al neniu kaj tial apartenas al ĉiu. Ĝi estas relative facila lerni, eĉ al tiuj kiuj ne havas specialajn lingvajn lernokapablojn. Esperanto ne estas nur "treege bona ideo", ĝi atingis al matureco kiel lingvo, kaj estas ideala por servi kiel ĵamborea lingvo, kaj por ĉiaj internaciaj geskoltaj okazaĵoj."

Skolta Esperantista Ligo publikigis novan rektmetodan ilustritan lernolibron pri Esperanto, speciale verkitan por geskoltoj. Eble iuj el vi neniam aŭdis pri Esperanto

of Esperanto, some one perhaps does not yet think highly of it. But, before making up your minds, make acquaintance of Esperanto and of the new book. You will be surprised and perhaps you will say: "Why did we not use Esperanto earlier?"

Yes, that is the question, why not Gulck writes: "In 1922 the League of Nations published a favourable report of Esperanto. UNESCO recognised Esperanto officially in 1954, and in 1961 the Universal Esperanto Association (UEA) enjoyed the high category of Membership B, in company with the Boy Scouts World Bureau."

The 6th Essex International Jamboree was held in Essex, Britain, last summer. It interested me personally for two reasons. I had been at the 5th jamboree 5 years ago, and besides: on the initiative of Tom Parrinder, O.B.E., Esperanto was used as the second Jamboree language. This was TP's opinion: "Using Esperanto as our second language has raised a great deal of interest and I am more sure now that if it were used as our Scout Language it would add greatly to our Jamborees and other International gatherings."

"Incidentally, at the Essex Jamboree, the Cultural Counsellor of the Japanese Embassy in London, who visited the camp, said he learned Esperanto some years ago and it was by far the easiest language for a Japanese to acquire .... and this goes for YOU, too."

Our textbook "Ĵamborea Lingvo" is prepared for you to give up traditional superstitions about Esperanto and so as to accept Esperanto as an official Jamboree language in Tokyo. The Secretary-General of the Boy Scouts World Bureau has stated: "I feel sure that Esperanto has a good future in our movement", and more recently: "I think that the Japanese Jamboree would be an excellent occasion to recruit many adepts for such a useful language."




aŭ kelkiu ĝis nun ne havis altajn pensojn pri ĝi. Sed, antaŭ ol juĝi, konatiĝu kun Esperanto kaj kun tiu ĉi nova libro. Vi surpriziĝos, kaj eble vi diros: "Kial ni ne pli frue utiligis Esperanton?"

Jes, jen la demando, Kial ne? Gulck skribas: "En 1922 la Ligo de Nacioj piblikigis favoran raporton pri Esperanto. UNESKO oficiale rekonis Esperanton 1954, kaj en 1961 Universala Esperanto Asocio (UEA) honoriĝis per la alta kategorio de Membreco B, kune kun La Monda Oficejo de Skoltoj."

La 6-a Internacia Ĵamboreo de Essex en Britujo okazis lastan someron. Ĝi havis personan intereson al mi pro du kaŭzoj. Mi ĉeestis la 5an ĵamboreon antaŭ 5 jaroj, krome: laŭ initiativo de Tom Parrinder, O.B.E., oni uzis Esperanton kiel la dua lingvo de la ĵamboreo. Tio estis la opinio de T.P.: "Per la uzo de Esperanto kiel nia dua lingvo, ni vekis sufiĉan intereson, kaj mi nun pli certas, ke ĝia uzo kiel skolta lingvo aldonos multon al niaj Ĵamboreoj kaj aliaj Internaciaj kunvenoj."

"Hazarde, ĉe la Ĵamboreo de Essex la japana kultura konsilanto de la Japana Ambasado de Londono, kiu vizitis la kampadejon, diris, ke li lernis Esperanton antaŭ kelkaj jaroj, kaj ke ĝi estas senkompara la plej facila lingvo por japano por lerni, ... kaj tiel estas ankaŭ por VI."

Nia lernolibro "Ĵamborea Lingvo" estas preparita por igi vin forĵeti la tradiciajn superstiĉojn pri Esperanto kaj ankaŭ por igi vin akcepti Esperanton kiel oficiala lingvo de la ĵamboreo en Tokio. La ĝenerala sekretario de Skolta Monda Oficejo diris: "Mi estas konvinkita, ke Esperanto havas riĉan estontecon en nia movado", kaj pli freŝdate: "Mi opinias, ke la japana ĵamboreo estos bonega ebleco por varbi multajn adeptojn por tiel utila lingvo."

El „World Scouting".




Finnaj skoltesperantistoj en skoltejo de Tapiola, dedekstre Seppo Tella, Mikko Haikala, Timo kaj Hannu Kaijanranta.




Grupfoto dum la SEL-kunveno. Ĉiuj kunvenanoj ne povis ĉeesti pro manko de tempo. Dedekstre f-ino Irja Klemola, prez. de Finna Esperanto-Asocio, kantoro Pauli Riihivaara el Turku, Timo Kaijanranta, s-ro E. Svane el Danlando, apud li D. Pease el Novzelando kaj W.G. du Temple el Kanado. Meze de la foto s-ro Savir kun blanka ĉemizo, dekstre de li s-ro Salzmann el Germanujo, antaŭ ili skoltineto ĉeĥa kun sia patrino. Maldekstre Mikko Haikala kaj Seppo Tella.



SEL-anoj en la centroficejo de Finna Knabskolta Asocio. Demaldekstre s-ro Eklund el Svedujo, s-ino Krenkova el Ĉeĥoslovakujo, s-ino Pollard, Aŭstralio kaj f-ino Niewenbroek el Nederlando.




# JAPANUJO! JAM NUN!

9 gvidantinoj de lokaj skoltinoj aliĝis al la unua Esperanto-kurso por skoltinoj aranĝita de Gubernia Sekcio Osaka de Japana Skoltina Ligo.

En 1970 la skoltinoj havos Internacian Ĵamboreon en gubernio Osaka. Ĝia ĉefa celo estas "Internacia Interkomprenado".

En 1971 la skoltoj havos Internacian Ĵamboreon sub monto Fuĵi. Kaj certe ankaŭ skoltoj en Osaka imitos la kurson de la skoltinoj.

Ni estos tre dankemaj, se skoltinoj ĉe vi bonvolos skribi al niaj kursaninoj. Uzu la adreson: ESPERANTO-SERVO-CENTRO OSAKA, Daido Kagaku Bil., 16 Suehiroĉo, 530 Osaka-Kitaku, Japanujo.

# REZULTO NORVEGA

La Ĝenerala Sekretario de Norvega Esperantista Ligo konferencis kun la ĝenerala sekretario de Norvega Knabskolta Asocio kun jenaj rezultoj:

a. Norvega Knabskolta Asocio konsideras proponon de la N.R. pri aĉeto de Ĵamborea Lingvo por senpaga distribuo al la trupoj, kiuj reprezentiĝos ĉe la Japana Ĵamboreo, verŝajne 100-150 skoltoj.
b. La Skolta Asocio aprobas kunlaboron kun la esperantckluboj, tiel ke ili havas permezon aranĝi prelegojn kaj kursojn.
c. La ĝenerala sekretario de N.E.L. ricevis permeson skribi artikolĝjn en "Lederen" kaj "Peff", la revuoj de la skoltestroj kaj patrolestroj.
d. La skolta asocio substrekas la eblecon gajni insignon "doganisto" kaj insignon "Esperanto".

# ANTAŬ ĈIO: DANKU




Ĉe ni la somero pasis - kaj kun ĝi ankaŭ la aŭtuno.
Ni ĝuis someran varmon, la vivdonan sunon kaj la verdan, florcriĉan naturon - la riĉajn donacojn de Dio.
Ni vidis la florojn velki, la foliojn flaviĝi, ruĝiĝi, forfali.
Baldaŭ venos la vintro. Kelkloke la neĝo kovros ĉion per la blanka kuseno, aliloke la nuda, "senviva" naturo montras sian grizecon kaj senesperon.
Sed ĉu ni estas senesperaj? Ĉu ne venos printempo? Ĉu la vivo mortis?
Ne, denove venos varmo, lumo, suno, kolcroj.
Tiel estas: Malantaŭ ĉio griza, senespera, estas tamen ĉiuj riĉecoj de la vivo. Ni nur devas vidi tion, kompreni tion. Kaj danki.

## KUN SALUTO




el Japanujo alvenis al la Prezidanto bildkarto:

Kara Prezidanto de SEL. Ni japanaj SEL-anoj kaj kunlaborantoj sendas al vi korajn salutojn kaj bondezirojn al vi. Kun SEL-anoj Hutida, Tokuda, Namba kaj Matubara mi konsiliĝis kiel prepari por la 71-a Ĵamboreo en Japanujo. Poste mi raportos al vi. Viaj fidelaj: Sinzo Sumiya, Rokuro Tokuda, Kotohiko Matubara, Iĉiro Tarao, Taori Fucida, Kim Namba.

## INVITO




el Germanujo venis invito
al TRILANDA ESPERANTO-KONGRESO
en Aachen 27. - 31. III 1970.

La kongreson aranĝas Belga Esperanto-Federacio Nederlanda Esperanto-Asocio L.E.E.N. kaj la Germana Esperanto-Asocio.
Kotizoj por junuloj GM 5, plenkreskulo GM 12
La junularaj sekcioj aranĝos komune INTERNACIAN JUNULARAN RENKONTIĜON de la 27a de marto ĝis la 4a de aprilo en la junulargastejo.
Informoj ĉe TRILANDA ESPERANTO-KONGRESO, 51 Aachen, Karl-Marx-Allee 172.




## PETO

Mi serĉas amikon aŭ amikinon kiu volas interŝanĝi leterojn pri turistiko kaj sporto kaj diversaj temoj kun 27-jara knabo, Miloslav Manych, SBCS, Trutnov, Ĉeĥoslovakujo.

## KAJ VIZITO




La 8-an de julio nia prezidanto kaj Douglas Davis povis en Londono akcepti s-ron Pedro Marqueta, NR por Hispanujo, kaj lia edzino, du filoj, filino kaj nevino. Ili estis survoje al Riga dum unumonata krozado.
En Londono ili kune lunĉis en Baden-Powell-domo, kaj la postan tagon ili kun Douglas Davis vespermanĝis en la fama Poŝtoficeja Turo, en la turniĝanta restoracio. Douglas Davis per tio povis rememori ilian gastemon en 1925, sed al Douglas Murphy tio estis la unua renkontiĝo post 45-jara korespondado.

## PAĜO EL "JAMBOREA LINGVO"


61. --ILO.

La horloĝo havas du montrilojn.
La montriloj montras la tempon.
La ŝlosilo estas por ŝlosi la ŝrankon aŭ la pordon.
Mi fajfas per fajfilo kaj mi hakas per hakilo.
Por kapti fiŝojn mi uzas fiŝ-kaptilon.
Mi tranĉas per tranĉilo kaj tondas per tondilo.
Mi kudras la pantalonon per kudrilo .
Mi skribas per krajono aŭ per plumo. Ili estas skribiloj.
Biciklo kaj aŭtomobilo estas por veturi: veturiloj.
Por direkti la aŭtomobilon mi uzas direktilon.
Ankaŭ la biciklo havas direktilon.
Se knabo ludas sur la vojo, mi uzas la sonorilon de la biciklo por averti lin.
La vojo-montrilo diras al mi, al kie mi iras.



Tre moderna skribilo estas la globo-krajono.
Kio estas globo-krajono ?

globo.



1. ŝlosilo
2. tranĉilo
3. tondilo
4. fosilo
5. sonorilo
6. kudrilo
7. direktilo
8. fajfilo
9. fiŝ-kaptilo
10. kombilo
11. hakilo
12. montrilo
13. manĝiloj.
14. skribiloj.
15. segilo
16. avertilo

Lernu la ilojn, kiuj estas en la bildo !

Naciaj reprezentantoj:

| | |
|---|---|
| Aŭstralio: | S-ro S.H. Milligan, 274 Mont Albert Rd., Surrey Hills, E 10, Victoria. Telefono WF 7948. |
| Aŭstrujo: | S-ro Heinz Kovacic, Grazbachstrasse 57, A-8010 Graz. |
| Belgujo: | (portempe aganta) Jozef Van Gulck, Lt Lippenslaan 33, Borgerhout (Antw.) |
| Brazilio: | S-ro Euclides C. Soares, Av. Almirante Tamandare 979, Belem, Para. |
| Britujo: | S-ro C. Bardsley, 42 Westbourne Street, Oldham, Lancs. |
| Danlando: | S-ro Sejer Holgersen, Fjnarsvej 99, Lyngby. |
| Finnlando: | S-ro Seppo Tella.<br>Studa adreso (vintre): Pieni Roobertink. 4-6 M 70, Helsinki 13, Tel. (90-) 666 707.<br>Hejma adreso (somere): Vucksenniska 9 кр Huhtasenkylä Puutarhatie. Tel. Imatra 51130. |
| Francujo: | Monsinjoro Patrick Truchemotte, 76, Rue Lombard, Bordeaux |
| Hispanujo: | S-ro Pedro Marqueta, Fern el Catolico 32, $5^{o}$ izqda, Zaragoza, Telefono 25 20 44. |
| Italujo: | Prof. Franco Tulone, Via Frangipene 8, 92019 Sciacca, Agrigento. Telefono 21.198. |
| Japanujo: | S-ro Sinzo Sumiya, Daido Kagaku Sooti K.K. 16, Suekirotyo Kitatu, Osaka. |
| Kanado: | S-ro John. H.F. Hoyle, Box 421, Forest Ont..<br>Helpa N.R.: S-ro Paul Ronald, 45, 10th Ave., Roxboro, Queb. |
| Kongo: | S-ro Paul Delojn Nzemba-Paku, Kalembelembe 225, St. Jean, Kinshasa. |
| Nederlando: | S-ro J.K. Hammer, Taxusstraat 7, Zaandam. Tel. (02980)-66931. Poŝtĝirkonto 63 22 46. |
| Norvegujo: | S-ro H.A. Rosbach, Nergt. 37c, N 6500 KristiansundN. Tel (073)-77620. Poŝtĝirkonto 9 86 06. |
| Portugalujo: | S-ro J.P. de Melo, Rua Jacinto Nunes 17-$3^{o}$Dt$^{o}$, Lisboa I |
| Usono: | vakas<br>Helpa NR: C. Stanley Otto, 7, Longview Road, Livingston, New Jersey, 07039. |

Douglas Murphy, telefono Felixstowe 5963
David Withey, telefono WAT 2936.
L. J. van Gulck: telefono 03-3688.08. Poŝtĝirokonto Belga Skolta Esperanto-Sekretariato 327460

LA SKOLTA MONDO. Memoru la limtempon: Ciam la unua de la dua monato de le

Naciaj reprezentantoj:

| | |
|---|---|
| Aŭstralio: | S-ro S.H. Milligan, 274 Mont Albert Rd., Surrey Hills, E 10, Victoria. Telefono WF 7948. |
| Aŭstrujo: | S-ro Heinz Kovacic, Grazbachstrasse 57, A-8010 Graz. |
| Belgujo: | (portempe aganta) Jozef Van Gulck, Lt Lippenslaan 33, Borgerhout (Antw.) |
| Brazilio: | S-ro Euclides C. Soares, Av. Almirante Tamandare 979, Belem, Para. |
| Britujo: | S-ro C. Bardsley, 42 Westbourne Street, Oldham, Lancs. |
| Danlando: | S-ro Sejer Holgersen, Fjnarsvej 99, Lyngby. |
| Finnlando: | S-ro Seppo Tella.<br>Studa adreso (vintre): Pieni Roobertink. 4-6 M 70, Helsinki 13, Tel. (90-) 666 707.<br>Hejma adreso (somere): Vucksenniska 9 кр Huhtasenkylä Puutarhatie. Tel. Imatra 51130. |
| Francujo: | Monsinjoro Patrick Truchemotte, 76, Rue Lombard, Bordeaux |
| Hispanujo: | S-ro Pedro Marqueta, Fern el Catolico 32, 5° izqda, Zaragoza, Telefono 25 20 44. |
| Italujo: | Prof. Franco Tulone, Via Frangipene 8, 92019 Sciacca, Agrigento. Telefono 21.198. |
| Japanujo: | S-ro Sinzo Sumiya, Daido Kagaku Sooti K.K. 16, Suekirotyo Kitatu, Osaka. |
| Kanado: | S-ro John. H.F. Hoyle, Box 421, Forest Ont..<br>Helpa N.R.: S-ro Paul Ronald, 45, 10th Ave., Roxboro, Queb. |
| Kongo: | S-ro Paul Delojn Nzemba-Paku, Kalembelembe 225, St. Jean, Kinshasa. |
| Nederlando: | S-ro J.K. Hammer, Taxusstraat 7, Zaandam. Tel. (02980)-66931. Poŝtĝirkonto 63 22 46. |
| Norvegujo: | S-ro H.A. Rosbach, Nergt. 37c, N 6500 KristiansundN. Tel (073)-77620. Poŝtĝirkonto 9 86 06. |
| Portugalujo: | S-ro J.P. de Melo, Rua Jacinto Nunes 17-3°Dt°, Lisboa I |
| Usono: | vakas<br>Helpa NR: C. Stanley Otto, 7, Longview Road, Livingston, New Jersey, 07039. |

Douglas Murphy, telefono Felixstowe 5963
David Withey, telefono WAT 2936.
L.J. van Gulck: telefono 03-3688.08. Poŝtĝirokonto Belga Skolta
Esperanto-Sekretariato 327460

LA SKOLTA MONDO. Memoru la limtempon: Ciam la unua de la dua monato de le

# SKOLTA ESPERANTISTA LIGO

PRESAĴO

SKOLTA E L

"ESTU PRETA"

AL

DE



LERNU ESPERANTON!

